# NIA PONTO

Grupo Esperantista
Barrencalle Barrena, 7- 1ª dekstre
48005-BILBAO (Hispanio)


Redaktas: Jesús-Miguel García Iturrioz.

Kunven-tago: Vendredo
☎: 94.416.44.92
☎(portebla):696.613.958
💻: tepgaitj@lg.ehu.es

**Normala jar-kotizo: 2.500 pesetoj/15 eŭroj** **BBK-konto: 22-1800155-0**

## NOVEMBRO/DECEMBRO 2000





## ZAMENHOFA FESTO-TAGO.

La **sabaton 16an de decembro**, kiel tradicie, ni kunigos ĉe la Grupejo ĉirkaŭ tablo plenplena de la manĝaĵoj alportitaj de la ĉeestantoj, por festi la Z-tagon. Al mallonga prelego sekvos diskutrondo en Esperanto. Vizitantoj estos bonvenaj.

Como ya es tradicional, el **sábado16 de Diciembre** nos reuniremos, **a partir de las 7,30**, para celebrar el nacimiento de Zamenhof. Alrededor de una mesa, mientras degustamos la comida aportada por los presentes, tendremos ocasión de hablar con viejos amigos. Te esperamos, junto a tus familiares y amigos.

**Estimad@ soci@: Si a la izquierda de estas líneas encuentras una "X", es que aun no has pagado tu cuota correspondiente al actual año 2000.**

## LOTERÍA DE NAVIDAD.

El **sábado 16 de Diciembre** será el **último día de venta de la lotería**. El número jugado, como ya es sabido, es el **46.421** y está a punto de agotarse. Recordamos que no se reserva lotería para nadie, así que el que quiera ser millonario, si aún no ha comprado su participación, debe venir rápidamente al Grupo.

Jam preskaŭ elĉerpiĝis la loterikvitancoj disvendotaj de nia Grupo; tiuj, kiuj ankoraŭ dezirus mendi kelkajn, rapidiĝu. Ni ludas la numeron **46.421**.

## E-KURSOJ.

Ĉijare denove ne eblis organizi elementan E-kurson en nia Grupejo pro manko de gelernantoj; tiu situacio ripetiĝas jam dum la 3 lastaj jaroj.

Alie, al la elektebla studobjekto "Lenguas planificadas: Esperanto", kiun klarigos Miguel Gutierrez Aduriz kaj Jesus-Miguel Garcia Iturrioz en la Vaska Universitato jam aliĝis 25 gelernantoj (el kiuj, 21 knabinoj) antaŭ ol la fermo de la enskribiĝ-periodo; tio signifas la okupiĝon de ĉiuj postenoj, kiujn ni ofertis.

## ARTIKOLO PRI ESPERANTO.

La sabaton 11an de novembro, en la interna kajereto "Focus" de la ĵurnalo "El Correo Español-El Pueblo Vasco", la plej legata en Vaskio, aperis tutpaĝa artikolo pri la ĉeesto de Esperanto en interreto, baraktanta en lingva marĉo, kie absolute regas la angla.

Diversaj opinioj de nia madrida samideano **Marcos Cruz** kaj informoj, interalie, pri Pasporta Servo, pri la E-virtuala biblioteko aŭ pri la DVD E-filmo "Incubus" kompletigas la raporton; en la lasta parto oni skribas pri la diversaj streboj starigi internacian lingvon.

Vere interesa artikolo, subskribita de ĵurnalisto nomata Iker Merchán.

## SUBVENCIOJ DE LA FONDAĴO ESPERANTO.

Por la estanta jaro, la fondaĵo Esperanto (Fundación Esperanto) disponigos specialan fonduson de 150.000 ptoj. (900 eŭroj), dividenda inter tiuj grupoj, kiuj respondecas pri la organizado de E-kurso, kun oficiala academia valoro, en iu hispana universitato. Nia Grupo jam faris la peton.

Estas aliaj agadoj subvenciindaj, pri kiuj vi povas informiĝi pere de "Boletín" de HEF aŭ ĉe nia grupejo.

## FORPASO DE PROFESORO ANTON ZACHARIAS.

(SLOVAKIO, 14-01-1939 / 13-09-2000)

Antaŭ kelkaj tagoj trafis nin la malfeliĉa novaĵo de la subita forpaso de Profesoro Anton Zacharias, en Košice (Slovakio). Li trovigxis Inter la plej elstaraj profesoroj de Esperanto laŭ la rekta metodo, kiun li perfekte kaj alloge mastris.

Tre populara en la tuta Eŭropo, animo de la movado, sindonema homo, havanta grandegan kulturtrezoron. Li perfekte regis, krom la slovakan kaj esperantan lingvojn, la ĉeĥan, polan, hungaran, rusan kaj germanan . Lia forpaso estas granda perdo por la slovaka movado kaj por la granda kvanto da amikoj kaj admirantoj kiujn li havis, ĉar homoj tiaj ne estas facile anstataŭeblaj kaj forgeseblaj.

(Raportis: Augusto Casquero).

## NENIU PAROLU SIAN PROPAN LINGVON.

Sten Heckscher, estro de la polico en Svedio, verkis artikolon publikigitan en la plej granda matena gazeto de Svedio, "Dagens Nyheter" ("La novaĵoj de la tago"), 2000 09 28. La rubriko estas: "Malpermesite paroli sian propran lingvon". Li proponas ke oni limigu al kvar la nombron de lingvoj en la organoj de la Eŭropa Unio, kaj ke neniu rajtu paroli sian propran lingvon. Tiel ĉiu estos devigata paroli alian lingvon ol la sian propran. Lia artikolo finiĝas per la demando: "Kaj ĉu iu povas elkovi pli bonan ideon kiu malhelpus la katastrofon [estiĝontan pro la kresko de membroj en la Eŭropa Unio] kaj konservus la egalrajtecon [de la lingvoj]?"

En la sama gazeto respondas, la 4an de oktobro, Häkan Lundberg, aktivulo de TEJO, en letero al la redakcio. Lia letero estis malpli videbla ol la artikolo de Heckscher, sed tamen la plej elstara el la hodiaŭaj leteroj al la redakcio. Lia letero portas la rubrikon "Unu sola lingvo sufiĉas por EU". Li asertas ke ekzistas unu ideo kiu estas pli bona ol tiu de Heckscher: Esperanto.

(Christer Kiselman .UPPSALA (Svedio). Kaptita en Interreto).

## LA ANGLA KAJ INTERRETO.

James Murdoch, la plej juna filo de la amaskomunikila magnato Rupert Murdoch, avertis ke la angla ne iĝos, senopone, la lingvo de Interrreto, kaj ke internaciaj firmaoj devas enkalkuli ĝian malpliiĝantan gravecon. Kvankam la angla restos ŝlosila lingvo por interretuzantoj, aliaj lingvoj pligraviĝas, kiel la ĉina, la hinda kaj la hispana.

Se komunikaj firmaoj volas konkuri en la tutmonda merkato, li diris, ili devas enfokusigi ĉiujn 4 lingvogrupojn. Ekzemple, troviĝos 96,6 milionoj da interretuzantoj en Ĉinio ĝis 2002. Kreskado de interreto en Ĉinio superas la prognozitan kreskon je 25%.

(Laŭ "The Guardian". Prenita el "Eventoj. 2/oktobro-2000)

## EL POPOLA ĈINIO MINACATA.

La oktobra numero de la fama revuo "El Popola Ĉinio" anoncas la ĉesigon de la eldonado. Ekde 2001 EPC aperos nur en la reto, ĉe la adreso http://www.china.org.cn/ElPopolaĈinio.

La malapero de El Popola Ĉinio estos grava perdo por la Esperanta gazetaro. Dum 50 jaroj (ĉi-jare EPĈ festis sian jubileon) ĝi informis pri Ĉinio al esperantistoj tra la tuta mondo. Lastatempe, pro ŝanĝoj kaj ekonomiaj malfacilaĵoj, oni tamen decidis ĝin ne plu aperigi en papera versio. Malaperos unu el la gravaj Esperanto-periodaĵoj.

Eblas ankoraŭ ion fari: reagi!. Ju pli da leteroj venas al la ĉina registaro kaj ĉinaj ambasadoj tra la mondo, des pli grandas la ŝanco, ke EPĈ pluvivos. Rakontu al la oficialaj instancoj kiom gravas EPĈ, kiom multe ĝi signifas por vi, kaj ĉiel subtenu la daŭrigon de la revuo.

Subtenajn leterojn sendu al la ĉina ambasado en via lando kaj al la ĉina registaro en Pekino, kaj sendu kopion de via letero al El Popola Ĉinio, P.O. Kesto 77, CN-100037 Pekino, Ĉinio, rete <epc@china-report.com>. Bonvolu disvastigi rapide tiun ĉi informon kaj instigi kiel eble plej multe da amikoj reagi!

(Miguel Gutierrez Aduriz)

**"NIA PONTO" TUTKORE DEZIRAS AL ĈIUJ SIAJ LEGANTOJ TRE FELIĈAJN FESTOTAGOJN KAJ PLENSUKCESAN NOVAN JARON**

**2.001 an**